



BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la
BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA

(B. K. L. E.)

Nacia Sekeio de la INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA

(I. K. U. E.)

APRILIO 1912

ENHAVO:

Pri malbonaj ĵurnalo. — Pri la movado por la flandra aŭ nederlanda lingvo en Belgio. — La Plezuroj de Esperanto. — III-a Internacia Kongreso de Katolikoj Esperantistaj en Budapeŝt (Hungarujo). — Oficialaj Sciigoj. — Katolika Societo Berlino. — Starigo de Anonima Akcia Societo, nomita: Internacia eldoniga Societo « Espero Katolika ». — Tutmonda Katolika Pedagogia unuiĝo. — Al la estimataj eksterlandaj Geanoj de I. K. U. E. — « Katolika Stelo » de Sabadell — Bibliografio. — « Kie estas la Eklezio de Kristo » ?


REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

ĉe LEO HEIDENDAL

A R E N D O N K

BELGA KATOLIKO

ORGANO DE
LA
Belga Katolika Ligo Esperantista
(B. K. L. E.)



NACIA SEKCIO DE LA
Internacia
Katolika Unuigo Esperantista
(I. K. U. E.)

REDAKCIO: Por ĉio kio koncernas la redakcion (artikoloj — informoj — broŝuroj — libroj — k.t.p.) oni sin turnu al:

ADMINISTRACIO: Por ĉio kio koncernas la administracion (reklamoj — mensejoj — anoncoj — k.t.p.) oni sin turnu al:

Sro Leo Heidental, ARENDONK.

Pri malbonaj ĵurnaloj.

En nia lasta Bulleno ni presigis la Gravegan Avizon de la Prezidanto de I. K. U. E. En tiu avizo li ĝenerale avertis la katolikoj pri ilia devo rilate al la legado de esperantaj presaĵoj; sed nun estas nia devo precizigi kaj doni ekzemplon de ĵurnalo kiun neniu katoliko povas senkulpe legi aŭ konservi. En la supre nomita Avizo Pastro Richardson parolis pri insultaj vortoj kontraŭ nia Sankta Patro lia Papa Moŝto, kiujn li legis en Esperanta gazeto. Por ne ofendi samideanon li ne nomis la ĵurnalon, sed li skribis tre amikan kaj ĝentilan leteron *private* al la Redaktoro, petante lin memori ke, laŭ lia propra programo, lia ĵurnalo estis kaj restos neŭtra, poste, li esprimis la deziron ke neniam plu li presigus vortojn kiuj povus vundi la konvinkojn de siaj katolikaj samideanoj. Al tiu fratema letero la Redaktoro respondis tute ne afable, li rifuzis ŝanĝi iel ajn la stilon de sia Revuo. Plue, li per longa artikolo klarigis la principojn de sia ĵurnalo nome « La Germana Esperantista Gazeto » eldonita en Magdeburg. Tiuj principoj estas ne nur kontraŭ la Katolika Religio, sed kontraŭ la *Kristanismo* kaj eĉ kontraŭ iu ajn kredo en *vera persona* Dio. Do, estas evidente ke ni katolikoj ne plu povos legi tiun ĵurnalon « sub gravi ». Vane la redaktoro rimarkis ke niaj Katolikaj ĵurnaloj ne

estas neŭtraj, sekve ke ni ne povus plendi pri tio, La komparo tute ne valoras. Niaj ĵurnaloj sin deklaras religiaj, Katolikaj organoj, ĉiu kiu abonas ilin antaŭscias ke li abonas ĵurnalon sindonatan al la disvastigo kaj defendo de la Katolika Religio. Male, la « Germana Esperantista Gazeto », sin anoncis kiel neŭtra, esperantista ĵurnalo. Ĉi faris grandan reklamon en diversaj landoj kaj petis al ĉiuj samideanoj helpi kaj propagandi ĝin. Tion multaj el ni katolikoj faris, multaj katolikaj abonis la G. E. G. neniel pensante ke, poste, ni estus legontaj en ĝi atakojn kaj insultojn kontraŭ nia Sta Kredo kaj la Dia starigita Estro de nia Eklezio. Estas kun granda bedaŭro ke ni nun devas por la unuafojo denunci esperantistan ĵurnalon. Ni faras alvokon al la tuta Esperantistaro por, ke la samideanoj tutmondaj atestu ke ne estas *ni katolikoj* kiuj komencis tiun ĉi disputon. Ni ĉiam klopodas kaj klopodos agi amike kaj samideane kun ĉiuj sed se ni pretendas ke ĉiu neŭtra ĵurnalo, kiu petas nian kunhelpon, almenaŭ respektu niajn plej karajn konvinkojn.

La Redakcio de « Belga Katoliko ».

Pri la movado por la flandra aŭ nederlanda lingvo en Belgujo.

De pli ol unu jarcenton la « flandra movado » estas agadanta. Neniu povas ankoraŭ ĝin nescikoni. Tiuj kiuj porbataladas tiun movadon scias kion ili volas, nome egalajn rajtojn en ĉio por la franca kaj la flandra lingvoj. Ankaŭ ili fortike esperas ke iutage ili havos kion ili ne malpli fortike volas.

Tiu movado neniel estas kontraŭ la Valonanoj (Wallons, Walen) nek kontraŭ la franca aŭ Valona lingvo. Ĝi ne estas kontraŭ la lingvo kaj la kulturado francaj ; ĝi tute ne estas problemo politika, nek religia ; ĝi estas demokrata problemo, socia puŝado, kiu entravas la interesojn ekonomiajn, intelektajn, moralajn kaj sociajn de la flandra-lingvaj laboristaj popolamasoj : ĝi estas nacia klopado por redoni al la flandra demokracio ĝian propran kulturadon kaj ĝian ĉiufakan elfloradon, por ke ĝi povu vivadi sian mem staran flandran vivon en ĉiuj ĝiaj elmontraĵoj, en ĉiuj ĝiaj esprimoj kaj manifestadoj.

Ĉiu sistema unuflankeco, ĉu literatura, ĉu lingvosciencia, ĉu aliscienca, ĉu ekonomia, estas kondamnita antaŭe ; ĉar ĉiu unuflankeco estas artefarita, kaj do ekster la reala vivo. Pro tio, la flandra movado okupas lokon apud la grandaj naciaj movadoj de nia tempo, la pola, slava kaj irlanda movadoj ; jes, ĝi estas io plua : ĝi estas tre karakteriza manifestado de la granda movado per kiu la Eŭropaj popoloj klopodas supreniĝi al pli da vivo, pli da bonestado, pli da membroj konscio.

Certe, la flandra movado estas senkaŝe kaj fundamente *katolika*. La plimulto el la kristanaj demokratoj agemaj estas flandruloj, t. e. amantoj kaj kultarantoj de la flandra lingvo. Unu el la precipaj artikoloj de la flandrula programo estas : Konservado de la kredo en la flandraj provincoj. Cetere, la katolika edukado fortikege laboradas por

supermaturigi la movilojn de la flandra movado, kaj apologiemaj institucioj alte floran- taj naskiĝis de la flandra agemeco.

Aliaflanke la liberaĉuleca programo estas entute kontraŭa al la flandra demokracio ; kaj ankaŭ la socialistoj neniel povas esti honestaj kaj sinceraj poruloj de la flandraĵoj : ĉar tiuj-ĉi estas vere kaj nur naciaj, male la socialismo estas internacia. Tutedire, ĉar Flandrujo estas katolika, la flandruloj volas pruvi per la progresadoj ekonomia, scienca, arta kaj morala kiujn ili volas efektiviĝi, ke nenio estas pli malmeritita kaj maljusta ol la riproĉo kiun oni faras al la religio katolika, nome ke ĝi kaŭzis la defalon de la popoloj restintaj fidelaj al la Eklezio.

La interesoj katolikaj kaj flandraj devas daŭrige resti unuigitaj. Ĉiam ili tiel restos, se la flandra popolo vidos ke la religia ĉefaro kaj la katolika partio prenas en manojn la justan aferon de ĝia gepatra lingvo. La katolikaro povas profiti per tiu forto, same kiel ĝi povas perei se ĝi ne prizorgas ĝin.

Ĉiuj katolikaj Belgoj, flandruloj, flandra- noj, valonanoj kaj kontraŭ-flandruloj bone estu konvinkitaj, ke la flandra problemo estas intime kunigita kun la katolika partio ; kaj ke, nun aŭ poste, ili estos devigataj definitive solvi tiun problemon por si mem, aŭ permesi ke aliaj ĝin solvu kontraŭ ili.

KIVO ZOERSEL.

La Plezuroj de Esperanto.

De Abato Richardson.

Esperanto ne nur estas rimedo por helpi al la progresado de l'homaro ; ĝi ankaŭ havigas al siaj uzantoj multajn feliĉajn momentojn. Sed se ni deziras ĝui ĉiujn Esperantajn plezurojn, ni devas posedi ĝian spiriton. Se ni nur alprenas Esperanton kiel amuzigilon, ĝi eble plenigos por ni malplenan horon. Ni rapide ĝin lernas. Sed ludi tiamaniere kun Esperanto ne longe ni amuzos, kaj tio ne estas la celo de ĝia aŭtoro, kiu dediĉis al ĝia konstruado dudek jarojn de konstanta laboro. Unu solan deziron havis D-ro Zamenhof, kaj tio estis, prezenti ilon per kiu la

homoj de ĉiuj nacioj sur la tero povus interŝangi siajn pensojn. Ĉi estas esence internacia, kaj nur estas per la internacia uzado, ke ĝi alportos al ni ian veran plezuron aŭ daŭrigan feliĉon. La Esperantisto al kiu mankas internaciaj rilatoj, aŭ voĉe aŭ skribe, scias nenion pri ĝiaj plezuroj. La spirito, kiu tre baldaŭ influas ĉiun veran Esperantiston, estas la amo al la tuta homaro. Ni ne povas korpe viziti ĉiun landon, sed povas per la korespondado, posedi geamikojn ĉiunaciajn. La korespondado, se nur poŝtkarte, kun tiuj, kiuj loĝadas en tre malsamaj ĉirkaŭaĵoj posedas sian propran allogon; kaj la elspezo de kelkaj penoj ĉiu monate. Vere, nia komuna internacia lingvo vekas en ni novan spiriton de universala bonkoreco. Sed ni povas viziti kelkajn landojn! Tiam, kian ĝojon alportas al ni Esperanto. Esti certa, ke ni trovas amikojn, kiuj ŝajne nur havas unu deziron; kiel agrabligi nian restadon en sia lando; ĉu tiu ĉi ne estas granda plezuro? Mi ofte ĝin spertis de post la tempo, antaŭ tri jaroj, kiam mi komencis lerni Esperanton. En Germanujo, Svisujo, Hispanujo, kaj Italujo, dank' al ilia konstanta afableco, mi pasigis tre ĝueblajn tagojn. Ĉiuj miaj Esperantaj geamikoj montris sin egale ĉarmaj. Se oni petas, ke mi klarigu kiel la nura fakto, ke ni parolas la saman internacian lingvon povas elvoki tian mirandan senton de bonvolo kaj reciproka amo en ĉiuj gentoj, mi ne povas doni decidan respondon, sed mi ne hezitas esprimi mian propran privatan opinionon, ke la Esperanta movado estas Dia laboro, kaj estas Dia laboro, kaj celas la pli perfektan plenumadon de tiu nova ordono « Amu unu la alian ».

(El Brita Esperantisto).

III-a Internacia Kongreso de Katolikoj Esperantistaj en Budapeŝt (Hungarujo).

I-a Cirkulero. (Epitomo el la protokolo de loka komitato).

Laŭ decido de l' II-a estas aranĝota nia III-a Kongreso en Budapeŝt, en la bela ĉe-

furbode miljaron vivanta lando, *Hungarujo*. Monsinjoro *Dr. A. Giesswein*, parlamentano, kiu invitis la III-an en Hungarujon, jam preparis bone la sorton de nia kongreso. Li havas komision ne nur de l' II-a, sed ankaŭ de *Hungarlanda Katolika Grandkunsido* por aranĝi nian III-an. Li ekkomencis sian laboradon en tiu direkto, ke la societoj de hungarlandaj katolikoj, ĉiuj proprigu nian movadon. Kaj efektive, jam la III-an aranĝos la "*Hungarlanda Katolika Federacio*," kiu klopodos fondi esperantistajn sekciojn en ĉiuj unuigoj de katolikoj.

La loka kongreskomitato fondiĝis kaj ekkomencis sian laboradon. Decidis la tempon de III-a. La loka komitato trovis plej konvenajn tagojn por la tria, je 22—23-an de aŭgusto, post la tagoj de VIII-a. La kongresa karto kostos Sm : 2=4.80 Kronojn. La adreso de organiza komitato estas : « ORSZAGOS KATHOLIKUS SZOVET-SÉG » (Hungarlanda Katolika Federacio) *Budapest, IV., Ferenciektere 7.* Kiuj intencas partopreni en la III-a Kongreso, ili sendu ĝeneralan poŝtkarton al la citata adreso, por antaŭanonco. Skribaĵon (nomon, profesion, adreson) legeblan ni petegas.

La organiza loka komitato.

(El Hungara Studento).

Oficialaj Sciigoj.

Respondante la multegajn demandojn. kiuj atingis min pri la adresaro de I. K. U. E., mi sciigas niajn gesamideanojn ke, konsiliginte kun nia kara Prezidanto kaj aliaj, la Komitato de I. K. U. E. decidis, forlasi sian uuan intencan, kiu celadis tuj eldoni adresarlibreton, sammaniere kiel U. E. A. eldonas membrolibron. — Ni opinias, ke pro diversaj gravaj motivoj, estas preferinde, publikigi la adresaron, pere de nia oficiala Organo E. K. antaŭ ol aŭ anstataŭ eldoni apartan libreton.

Utiligante nian E. K. por la publikigado de nia adresaro, ni unue agados laŭ deziro eoprimata dum « Nia Dua ».

Due ni, tiel farante, esperas efiki, ke tiuj

samideanoj kiuj ĝis nun ankoraŭ ne abonis nian oficialan organon, fine konvinkigos, ke ili fakte bezonas ĝin, se ili deziras justatempe konatiĝi kun la plej gravaj sciigoj pri la I. K. U. E. aferoj kaj Anoj.

Trie, ne eblos pli frue rekompenci tiujn samcelanojn, kiuj laŭdirindege penadis kolekti ĉiujn sciidaĵojn rilate niajn diverslandajn samreligianojn.

Ĉar la Belga sekcio de I. K. U. E. honorigas havi inter siaj eminentaj membroj, la estimatan Prezidanton de I. K. U. E., ni kredas agi laŭdeve, se ni unualoke publikigas la Belgan membroliston, kiu, per la zorgoj de nia ĉiam laborema Estro internacia, lia Pastra Moŝto A. Richardson, fariĝis modela adresaro, imitinda de la alilandaj sekcioj.

Komprenoble nia meritplena Redaktoro de E. K. decidu pri la loko kaj maniero je kiu li presigos la adresaron. Mi estas certa, ke bonege kaj kontentige li prizorgos la aferon.

Fine mi atentigas la legantaron, ke mi publikigos ne nur la adresojn de la Katolika Esperantistaro, aliĝinta al I. K. U. E., sed ankaŭ iliajn oficiojn rilate I. K. U. E., alivorte : sciigante la nomojn kaj adresojn de nia anaro, mi intencas aldoni ĉu iu membro estas pastro (P) ; ĉu li prenas konfesion esperante, (P. K. E.) ; ĉu li estas helpisto (Help) ; t. e. ĉu li deklaris sin preta laŭpove helpi samreligianojn, kiuj petas lian helpon ekzemple dum vojaĝo al urbo, en kiu loĝas, aŭ kiun konas la « helpanro », ĉu li korespondas esperante (Kor.)

Komprenoble I. K. U. E. intencas neniel devigi siajn anojn respondi al demandinto, kiu ne aldonis respond-kuponon. Mi speciale memorigas je tio, ĉar el ĉiuj korespondantoj, kiuj skribis al mi, nur *du* ne forgesis aldoni respondelspezojn.

Pri la I. K. U. E. regularo mi esperas komuniki kelkajn sciigojn en la sekvonta korespondado.

Estimege via en K-o.,

FRANS KNAAPEN,

Sekr. gen. de I. K. U. E.

Tilburg, Febr. 1912.

(Esp. Kat.)

Katolika Societo Berlin.

La katolikaj gesamideanoj de Berlin fondis la 22-an de Januaro 1912 « Katolikan Societon Berlin ». Ĝia celo estas unupartite peresperante agadi por la internaciaj katolikaj interesoj laŭ la senco de I. K. U. E., aliparte flegadi kaj diskonigi la esperantolingvon inter la katolikaro de la germana ĉefurbo. La societo aliĝos al I. K. U. E. La 1-an de februaro ĝi havis 18 membrojn. Korespondantojn oni bonvolu adresi al : S-ro Fromm, Charlottenburg, Schulstr. 14 (Germanujo).

Starigo de Anonima Akcia Societo, nomita : Internacia eldoniga Societo « ESPERO KATOLIKA ».

Ni rememorigas al niaj legantoj pri la artikolo en la Februara numero de E. K. pri la Akcia Societo starigota. Ni petas partoprenontojn kiel eble plej baldaŭ sciigi nin pri sia partopreno. La mono (f. 60.50 po akcio) devos esti sendita antaŭ la 1-a de Aprilo 1912. Ni atentigas la legantojn, ke la valoro de ĉiu akcio estas f. 60.50 nederlandajn florenojn (proksimume 50 Sm.) Por informoj sin turni al subskribanto.

La Regularo de la Akcia Societo estas jam definitive starigita, sed ne ankoraŭ presita. Tuj post ĝia apero ni sendos ĝin al partoprenantoj k. t. p.

Ĝis la 25-a de Februaro sekvantaj personoj sciigis nin pri partopreno :

P-ro Austin Richardson, Bruselo	unu akcio.
S-ro Höfeler (Ĉefeĉ), Londono	unu »
F-ino M. Larroche, Paris	10 »
F-ino de Colleville, Montauban	6 »
S-ro Cl. Colas, Paris	6 »
S-ro Turquet, notario en Laval	unu »
S-ro H. B. van Zwet, Utrecht	unu »
F-ino Ida Hornung, Augsburg	unu »

P-ro Patrick Parker, Wexford 2 »
 S-ro Frans Knaapen, Tilburg unu »
 D-ro SMULDERS
 (Esp. Kat.)

Tutmonda Katolika Pedagogia unuigo.

(Pastro H. Madlener, en Nürnberg (Bavarujo) sendis al ni jenan sciigon :)

» Al la unuigoj, kiuj aniĝis al la nomita tutmonda unuigo, kaj al ĉiuj, kiuj rigardas la kristanan edukadon de la junularo kiel rimedon, por renovigi ĉion en Kristo, jen oni sciigas, ke la kongreso por kristana edukado estas fiksita definitive al la mezo de Septembro 1912. Ĉi okazas ĵus antaŭ la sama en Wien (Vienno) tiutempe okazonta, eŭkarista kongreso. Lia reĝa kaj imperiestra moŝto, la tronheredanto Francisko Ferdinando, akceptis la protektantecon por la kongreso kaj Lia Eminenco kardinalo Mercier (ankaŭ favoranta de nia I. K. U. E.), la eminenta belga pedagogo, sciigis sian partoprenon. La treege konata seminar-direktoro, D-ro Giese, helpas la entreprenon ne nur per sia kunlaborado, sed ankaŭ metante je dispono nombron da litoj kaj ĉambroj.

» En la kongreso oni unue pritrakto la edukadlaboron rilate la homan vivlaboron kaj difinas la celon de la edukado, kiu konsistas en la instruado de la moralaj kaj intelektaj bonoj al la idaro kaj en la anigado de la junularo al la socialaj asocioj.

» Plue, oni klarigos kontraŭ la multaj temp-eraroj la rilatojn de la pedagogio-kaj didaktiko al la religio kaj difinas la esencon kaj signifon de la natura moralo. Same oni pridiskutos tempdemandojn, ekzemple la infan-psikologion, la eksperimentan esplord-manieron, la individuecon de la virina edukado rilate al naturo, historio, kaj revelacio dia, la unuecon de la edukado kaj de la instruistaro laŭ kristana kompreno de metio. La komitato serĉos por ĉiuj raportoj rekonatajn aŭtoritatulojn.

» Kiel fina termino por alsendado de skribaj raportoj pri la nomitaj temoj estas fiksita la 1-a de majo 1912. Ili devas esti verkitaj en germana, franca aŭ angla lingvoj, kaj es-

tos presitaj kun la raportoj kongresaj.

» Aligojn akceptos la oficejo (ankaŭ L. Auer, jun, Donauwoerth, Bavarujo).

» En apartaj kunsidoj oni priparolos fundamentajn demandojn pri la plua disvastigado de la tutmond-unuigo. Ĉiuj aliĝintaj unuigoj bonvoln sendi riprezentantojn ».

Rimarko : Supra artikolo alvoka estas esperantigita el « Die christliche Schule », (la kristana lernejo) (redaktoro prof-ro d-ro G. Wohlmuth en Eichstaett. Bavarujo) kaj ĝi klare montras la vigecon de la vivo katolika internacia Kiam tiaj unuigoj komprenos la utilon de Esperanto por sia celo ?

Bonvolu ĉiu ano de nia amata I. K. U. E., diskonigi ĉi supran alvokon en tiaj rondoj. La cirkonstanco, ke nia alia favoranto, Lia Eminenco Kardinalo Mercier partoprenos, eble plifaciligos ilian laboron !

Al la estimataj eksterlandaj Seanoj de J. K. U. E.

L m s-ro I. A. Kral, Direktoro de Internacia Literatŭr-Institŭto Katolika en Munĥeno aligis al ĉi tiŭ institŭto

Internacian Oficialan Presoficejon de I. K. U. E.

Li intencas konstante raponti al la ĉefgazetapo tutmonda pri Esperanto kaj la I. K. U. E.

La I. K. U. E. anaro tutmonda ĉi kŭne mi petas treege, ke ĝi helpŭ kiel eble plej energie !

Kunlaborantoj sendas tŭj iliajn adresojn al la presoficejo mem

(Munĥeno Germanlando, Herzog-Rudolfstr. 15).

Precipe oni sendŭ al ĉi tiŭ oficejo ĉiajn artikolojn pri atakoj gazetaj kontraŭ Eklezio, Religio aŭ Lernejo kaj donŭ klarigojn pri demandoj, kiŭjn la presoficejo fiksos !

R. SCHOLZ

Ĉefdelegito de « Branĉa Unuigo, Bavaruja » de I. K. U. E.

« Katolika Stelo » de Sabadell.

La pasintan 10-an de Decembro tiu societo festis sian unujaran datrevenon per tre interesa kunveno, en kiu partoprenis famekonataj kunlaborantoj en nia katolik-esperanta movado.

Ĝi ja ne estis nur propaganda poresperanta festo, sed ĉefe estis grava festo propaganda peresperanta de niaj katolikaj idealoj, precipe en la social-agado. Preskaŭ tuta la programo estis plenumita de tiaj temoj.

« Esperanto kaj la katolikaj Sindikatoj » estis la temo sur kiu disertaciis S-ro I. BODA, kaj per kiu li priskribas la sindikatagadon nuntempan, ĝian necesecon kaj utilecon kaj fine kiel per Esperanto estas atingebla tiu celo de la Sindikatoj : starigi Internacian Katolikan Sindikaton.

« La nuntempa edukado de la virinoj ; kio ĝi estas kaj kio ĝi devos esti laŭ la misio, kiun Dio al ili komisiis » estas pritraktata de S-ino Maria Bosch. Ŝi raportas pri tiu ammisio, kiun Dio komisiis al la virinoj. Ili devas esti pacaj steloj en la familio. Prave eraras tiuj kiuj instruigas al la virinoj necesajn aferojn, ofte eĉ embarasigajn aferojn, tiel kiel ludi la pianon, dancojn k. t. pl. La edukado de virinoj devas celi ĝi virinojn utilajn, kapablajn por alporti tiun pacon en la familio.

« Esperanto kaj la katolik-agado » jen afero, kiun pritraktis nova kaj fervora samideano D-ro Josefo Rull, paroĥestro en Sabadell. Certe nia kataluna esperantistaro trovos entuziasman kunlaboranton en tiu nova samideano, se ni juĝos laŭ la entuziasmo de lia unua parolado. Li resume diris, ke la agado estas necesa en la Katolika Eklezio, kaj rimarkis, ke tiu agado estos certe efika, se ĝi estus internacia, tutmonda, kion oni akiros facile, dank' al la helpo de Esperanto.

Fine mi mem parolis pri la temo : « Esperanto kaj la Katolika Apologio ». Mi resume raportis pri la laboroj apologiaj faritaj kaj farotaj de nia I. K. U. E. kaj detale priskribis la agadon de nia kunbatalanto P-ro Dowling. Mi parolis ankaŭ pri la utileco, ke ni ĉiuj uzu Esperanton por helpi nian Eklezion,

ĉefe nuntempe en nia lando, en kiu la malamikoj de Romo laboras senĉese por detrui, pereigi, la religion el nia popolo.

Ankaŭ kelkaj samideanoj legis poeziojn kaj ludis muzikaĵojn. La Festo finiĝis per ludado de komedieto de nia senĉesa laboranto S-ro Forniella.

Mi nur devas aldoni ke la ĉeestantaro esti grandnombra, kaj laŭ la verŝajna opinio de kelkaj ĉeestantoj, neniam oni vidis tiel grandnombran ĉeestantaron en la esperantistoj festoj, kio pruvas ja, ke ne nur Esperanto kreskas ĉe ni, sed ankaŭ kreskas ĉiutage nia katolik-movado.

La delegito,
D-ro JOAKIMO COLL.

(Esp. Kat.)

BIBLIOGRAFIO.

Fabiola, rakonto pri la Katakomboj, de Kardinalo Wiseman, tradukis E. Ramo. Bela, zorge ilustrita volumo da 427 paĝoj en 8-a. Prezo Sm. 1.40 (fr. 3.50) (Universala Esperantia Librejo, 10 Rue de la Bourse. Genève).

Kiam, antaŭ jam kvindeksep jaroj la fama arĥiepiskopo de Westminster Kardinalo Wiseman publikigis sian gravan verkon "Fabiola", ĝi tuj ricevis grandan sukceson ne nur ĉe la Katolikoj, sed ĉe ĉiuj amantoj de vere literaturaj verkoj. kaj de tiu tempo ĝis nun la verko konservis sian tutan valoron.

Saman sukceson sendube ricevos ĉe la internacia gelegantaro la lerta traduko de Ramo.

Ni ne povas ĉi tie resume la rakonton, kiu estas interesa je duobla vidpunkto : tiom pro historia elvoko de primitiva Eklezio, kiom pro la psikologia studo de evoluo de sentema animo al la Vero. La aŭtoro majstre revivigas antaŭ ni la vivmanieron kaj la morojn de Roma societo dum la kvara jarcento ĉe paganoj kaj kristanoj. La ĉapitroj dediĉitaj al priskribo de la Katakomboj estas nepre rimarkindaj kaj interesplenaj : oni bone sentas ke la aŭtoro, dum li estis estro de la An-

gia Kolegio en Romo, perfekte konis la priskribitaj lokojn kaj eĉ ĉeestis la elfosadojn.

Meze de paganoj, inter kiuj miksiĝas kelkaj kristanoj, vivas Fabiola malestimanta la Kristan doktrinon, kiun ŝi konsideras nur kiel ridindan superstiĉon, sed kiun ŝi ne konas. Iom post iom ŝi nevole konatiĝas kun la instruoj de Kristo, precipe dank' al interparoladoj kun sia fidela orienta sklavino kaj al la ekzemploj de belaj noblaj karakteroj, kiujn ŝi admiras kaj ŝatas, nesciante, ke ili trovas sian fundamenton en ia religio de Kristo.

La lerta tradukistino mirinde sukcesis konservi la vigecon de l' originala stilo uzante nur plej puran Esperantan lingvon. Kiam oni rememorigas, ke Ramo donadis al Esperanta literaturo « En Svislando », « Dankon », « Kredo kaj scio » k. t. p. oni ne bezonas plu insisti pri la korekteco de la Esperanta teksto, nek pri la talento de la tradukistino. Ŝi meritas ĉian laŭdon, tial ke ŝi riĉigis nian literaturon per bone elektita verko rimarkinde tradukita.

La samideanoj, eĉ tiuj, kiuj konas nacian eldonon de Fabiola plezure legos la Esperantan tradukon : ĝi estas taŭga pruvo pri la fleksebleco de la lingvo, kaj la verko mem estas tre rekomendinda ankaŭ al nekatolikoj.

Ni esperas, ke tiu mallonga skizo sufiĉos por instigi niajn samideanojn al legado kaj diskonigo de Fabiola.

Ili tion ne bedaŭros.

D-ro RAYM. VAN MELCKEBEKE.

El « *Espero Katolika* ».

Ni plezure prezentas al niaj legantoj ĉi tiun belan artikolon verkitan de la lerta Vic-Prezidanto de la « Belga Katolika Ligo ».

« *Kie estas la Eklezio de Kristo* » ?

Jen la titolo de verko, bone konata en Nederlando de katoliko kaj ne-katoliko, verko, de kiu aperos esperanta traduko je l' fino de tiu-ĉi monato. (Marto)

La tradukintino estas F-ino M. Borret, sekretariino-kasistino de « Nia Dua », kaj la eldonisto estas A. N. Govers en Hago (eldonisto de *Espero Katolika*). La verko ampleksos 59 §§ kaj ± 164 paĝojn kaj kostos proksimume 0.50 Sm.

Jam de longe tiu-ĉi traduko estis anoncita. Eĉ Pola pastro Szurek atentigis pri ĝi la legantoj de E. K. (Vidu E. K. Nov. 1911, p. 291-294) Pro la graveco de la enhavo la tradukintino zorgis, ke ŝia traduko estu travidata de lerta esperantisto, kaj Mousinoro Callier, Episkopo de Haarlem, elektis esperantistan pastron por plej akurate ekzameni la esperantan tekston, por ke ĉiuj esprimoj je religia vidpunkto estu konformaj al la Nederlanda teksto ; la verko aperos kun « Eklezia Aprobado ». Unu kaj alia malrapidiĝis la eldonon, sed kompanse la verko estos je lingva kaj religia vidpunkto plene fidinda kaj rimarkinda.

Despli rimarkinda, ĉar ĝia enhavo estas ora. Simplaj, klaraj, logikaj pensoj kaj pensaroj ĝuigas la spiriton de la plej simpla ĝis la plej instruita leganto. « La pura vero antaŭ ĉio » estas la sola devizo de la verkisto. la dolĉa kateno, kiu katenas la legantojn al la libroj kaj instigas al plua kaj ripeta legado.

Kiu miros, ke tiu-ĉi verko vidis en la malgranda Nederlando malofte multajn reeldonojn kaj milope estis legita de Nederlandlingvaj katolikoj kaj ne-katolikoj ? Inter tiuj-ĉi lastaj *multaj* dankas konvertiĝon al la patrina Religio, ĉiuj liberigon de antaŭjuĝoj kaj pli bonan konon kaj do ŝaton de nia Religio kaj Eklezio : tiuj-ĉi konstanta trafcelo por la venenigaj sagoj de mensogo kaj kalumnio, laŭ la demona devizo de Voltaire : « Mensogu, mensogadu ; ĉiam la trafita vesto restos almenaŭ iom malpurigita per koto ».

La pia verkisto nu elfaldas la blankan veston repurigitan de la vera Eklezio de Kristo antaŭ niaj okuloj : kiel rava ĝi estas por ĉiu alrigardanto sincera, bonvola, bonintenca !

P-ro van der Hagen, S. J. tutkore aplaudis la tradukon de sia multvalora verko. Kiel bedaŭrinde, ke li ne vidis la aperon de la traduko ! Plaĉis al Dio doni al li la eter-

nan rekompencan. Naskita 19 Aprilo 1847. Li mortis « in Domino » 26 Februaro 1912 en Roterdamo. Li estis vere « pastor bonus », kiu tutan sin donis al siaj ŝafoj, al siaj malriĉuloj, al la multaj laboroj, kiujn li entreprenis. Pro lia sankta vivo oni nomis lin dumvive : « la sanktuleton ». Ni preĝu por la perfekta ripozo de lia hela animo.

Sed per sia verko, kiu estas aperonta en

Esperanta [traduko, li komencos post sia morto bonfaradi tra la tuta mondo. Akceptu ni, katolikoj esperantistaj, lian verkon kiel sanktan kaj valoran heredaĵon *Espero Katolika*, por honori lian memoraĵon, jen donas kelkajn paĝojn el ĝi, kun afabla permeso de la tradukintino.

D-ro SMULDERS.

(El *Espero Katolika*).

Katolikoj Samideanoj

NE FORGESU AĈETI LA

Belegan preĝlibron

« **Katolika Juvelan** »

kaj la

Belan de Ramo tradukiton verkon

« **FABIOLA** »

Reklamanoncoj.

1/2 da paĝo = Frkj	<i>Unufojo</i>	<i>10 Fojoj</i>
	6. —	18 —

1/8 da paĝo
unufojo = Frkj 3.40
10 fojoj = Frkj 6. —

1/4 da paĝo
unufojo Frkj = 4. —
10 fojoj Frkj = 10. —

1/16 da paĝo
unufojo = 1.50

1/16 da paĝo
10 fojoj = 4.00

1 paĝo unufojo = frkj 10. — 10 fojoj = frkj 30.00.

Oni Rikoltaskion oni Semas!

GEESPERANTISTOJ,

Se dum la Somero, vi deziras en via ĝardeno belajn florojn kaj sur viaj tabloj bon-gustajn legomojn, aĉetu ĉiam viajn semojn ĉe la bonkonata firmo :

J. VAN DE VELDE-VAN LUNEN

negociisto en Semoj

starigita en la jaro 1865

« IN DE RAAP »

Geite straat, 28, *Mechelen*.

(Prov. Antwerpen)

Oni korespondas Esperante.

Atentu Geesperantistoj.

La plej efika kuracilo por la tuso kaj ĉiaj malsanoj de la gorgo, brusto aŭ bronkoj, estas la mondkonataj pasteloj :

Spa Goudron

haveblaj ĉe multaj apotekistoj kaj *rekte de la elpensinto*, S-ro. Desonay, Spa, Belgujo, en beleta skatoleto je 60 spesdekoj = fr. 1.50.

Abato Richardson skribis al S-ro. Desonay de Bruselo : « Korajn dankojn pro viaj pas-teloj «SPA GOUDRON». Dank' al ili mia » bronkita tuso malaperis preskaŭ ensorĉe ».

Geesperantistoj,

Se vi deziras havigi la plej perfektan Gramofonon, mendu la lastan elpenson, t. e. la Gramofonon sen trumpeto kaj sen pikilo. La safiro de « Pathé » anstataŭas kaj multe superas la malnovan pikilon. Multaj Pastroj, Kolegioj k. t. p. sendas laŭdemajn leterojn al la Fabrikistoj. Petu cirkulerojn de la Société Française des Machines Parlantes, 89, Boulevard Brune, Paris.

Intersangantoj internaciaj, atentu !

La mondkonata Asocio U. E. A. kreis novan fakon kies celo estas plifacilig kaj certigi la internacian korespondadon inter esperantistoj.

La nomo de tiu-ĉi fako estas : « **Universala intersanga asocio** ». La fakestro estas S^{ro} Michel Lévy. (7. Rue Porte-à-Meuse, — St-Mihiel — Meuse-Francujo) La U. E. A. havas apartan bultenon kiel senpagan aldonon de « Esperanto ».

Pri pluaj sciigoj, sin turnu al : S^{ro} R. De Leener, Konsulo de U. E. A. por junuloj kaj intersanĝo. 69, rue Neuve — Bruxelles. —

INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.

(I. C. E.)

Monata jurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la interŝanĝo de poŝtmarkoj, kaj korespondado per ĉiuj lingvoj. la Abono = frkj. 2.50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio : Avenue du Moulin, 16, Forest-Bruxelles.

PROponoj POR INTERKorespondado.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ.

N. B. Estas devo je honoro respondi al ĉiu korespondanto almenaŭ unufoje.

S^{ro} Bernardo M. Serra, C. O. P. de Vilafora. Vich. Hispanujo.

S^{ro} Vidikvoski, 2833, Livingston S^t Philadelphia, Usono.

S^{ro} G. Van Oijen, 76, Engelenburgstraat, Den Haag, Nederlando.

S^{ro} O. Tromm, 14, Schulstrasse, Charlottenburg, Germanujo.

Pastro G. Saccardi, Castalpino, Sienna, Italujo.

Pastro Risto M. Popovich-Cupick, Danolovgrad, Montenegro.

S^{ro} Methodi Therzianoff, Macedona librejo, Sofia, Bulgarujo.

S^{ro} Traj'e Ĉakarevic, Lyceo Imperia, 302, Uskub, Turkujo.

S^{ro} J. Mendrkieviĉ, Doktoro, 52, Długa Str. Krakovio, (Aŭstrio).

S^{ro} A. B. Seitov, 36, Uĉelnaja Omsk, Azia Rusujo.

S^{ro} J. Merino, Berabeŭ, Argentina Respubliko.

La membroj de la Grupo « Zamenhof », sin turni al S^{ro} Richardson, 121, Rue du Marais, Bruselo.

La membroj de la Grupo « Antaŭen », sin turni al la Prezidanto S^{ro} E. Baez, Montenegro Strato, 13, Bruselo.

S^{ro} Lambert Dederichs 53, Rue des 4 vents, Bruselo.

Pastro Decoene, Roman Catholic Church, Brandon (Man.) Canada. Povas nur doni adresojn, ne persone korespondi.

S^{ino} Doktorino Biske, 69 por la Grupo de Spa, Hôtel de la chaîne d'or. Povas doni multajn adresojn.

S^{ro} Robert De Leener, Rue Neuve, Bruselo.

La grupo de Basel, Svisujo. Adreso : Sro Rusterholz, Prezidanto 22, Marschalkenstrasse.

Fino Maud Séwell, Whitehall Cottage Bishops Stortford, Anglujo.

S-ro Wallace Mackay, 22, Coniston Avenue, Newcastle-on-Tyne, Anglujo.

S-ro T. Tchacarevitch, Lycée Imp' Ottoman, Uskul, Turkujo.

S-ro G. N. Appleton, Lynchburg, Va. United States N. America.

S^o Petro Stolk, 32 Waterloostraat, den Haag, Hollande (precipe kun gekatolikoj).

D^{ro} Marko Pavloviĉ, reĝa, trib-ĵugisto. Temes var. Hongrie. I. P. K. kaj L.

Rev. P. Primavesi, S^t Bridgeis Catholic Church Warrington, Angleterre (li povas doni adresojn).

Fino Ina Crafer, 6, Hannover Road, Norwich, Angleterre.

Rev. Pastro Desray, Profesoro, Ancenis France.

Rev. Pastro Dol. Valensole, Basses Alpes France, I. P. K.

Fino Elly Hanau, 32 Moritzstrasse, Germanujo, Wiesbaden, I. P. K.

Fino Anna Köhler, 52 Casselerstrasse, Wolfsanger bei Cassel, Allemagne.

Miss Campell Brown Olenlosia, S^t Davids Street Lyttleton, New Zealand, I. P. K.

S^o J. L. Stanyan, Montpelier, Vermont Etats Unis, Amerique.

D^r H. W. E. Moller, Ruysdaelkade, 21, instruisto.

P. Janssen, Nieuwendijk, 183, korespondisto.

H. Douwes, 1^o Oosterparkstr., 228, instruisto.

F-ri C. Kamp, O.-Z. Voorburgwal 167, Kalkulistino.

H. van Dam, Kanaalstraat, 38, Oficisto.

La Centra katolika Esperanta Oficejo

« ZAMENHOF »

AREN DON K



Akceptas mendojn por ĉiuj
Esperantaj libroj.

Vendas Esperantajn verkojn,
Gramatikojn, lerno kaj legolibrojn
Esperantistajn insignojn
k. t. p.

Kelkaj verkoj el la « Librejo »

Spirita Juvelaro	fr. 2.20
Katolika Preĝaro	fr. 2.60
La Kvar Evangelioj	fr. 1.60
Hebrea Kalendaro	fr. 0.50
Fabiola	fr. 3.80

k. t. pl.

Adresu ĉiujn mendojn al :

La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »
AREN DON K

LIBREJOJ Esperantistaj

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.
Spineux & C^o Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

HOTELOJ

COURTRAI : « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenojo por Esperantistoj.

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenojo.
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko,
apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

Oni parolas Esperante.

LONDONO : Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ».
Sinjorino O' Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square. Bayswater,
London, W. Tre moderaĵ prezoj.

Rekomendindaj Firmoj

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.

Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj
Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpaĵoj : ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX
kaj Filoj : 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.